



La Riverego

Maro 2002

Esperanto-Societo Kebekia

N^{ro} 66, Jaro 16^a

Festado de 20-jariĝo de la Esperanto-Societo Kebekia

Junio 2002.

1-2^{aj}: **Semajnfino Esperanto kaj biciklado (SEBO)**: Sabate okazos bicikla (aŭ pieda) ekskurso al malnova Montrealo, prelego pri riparado de biciklo, komuna vespermanĝo aŭ pikniko, vespere amuza programo... Dimanĉe, ni invitas vin bicikle partopreni *le Tour de l'île* kun junaj esperantistojn el Usono. Aliĝu frue je: esperanto@sympatico.ca aŭ 514 272-0151

Septembro 2002.

Vendredon la 6^{an}: Montreala Esperanto-Domo (MEDO) je la 18:00: **Latinamerika vespermanĝo** (kunportu pladon por dividi), sekvos raportoj pri la someraj kongresoj en Brazilo.

Vendrede la 13^{an} je la 19:30: **Amika babilado** en *Café Espéranto*, 250 rue Mont-Royal Est, Montrealo. Ni povus supreniri la monton poste !

21-22^{aj}: **Autŭna semajnfino en Kebeko**. Vizito al muzeo aŭ malnova urbo, komuna manĝo kun lokaj Esperantistoj, vizito al *Café Jeunesse Espéranto* en Lévis kaj al la esperanto-strato en Kebeko (*Ste-Foy*). Aliĝu frue ĉe: esperanto@sympatico.ca aŭ (514)

272-0151 Ebla kunveturado. Ni tranoktos ĉe Esperantistoj aŭ en junulara gastejo.

Vendredon la 27^{an}: MEDO, 19:30: Temo: Muziko en esperanto, ludo pri olimpikaj himnoj, ktp...

Oktobro 2002.

Vendredon la 5^{an} je la 18:00: **Panoj kaj Fromaĝoj** (kunportu panon kaj fromaĝon por dividi) ni provizos la legomojn kaj trinkaĵon. **Patriko kaj Jacqueline** bonvenigos nin, 1043 rue Pratt, Outremont. Uzu metroon Outremont, poste buson Van Horne oriente ĝis strato Pratt.

12-13-14^{aj}: Okazos la 9^a **Internacia Semajnfino Esperantista** en OKEMO, Vermonto. Aliĝu frue. Vizitu nian retejon por pli da detaloj.

Vendredon la 18^{an} je la 19:30: **Amika babilado** en *Café Espéranto*, 250 rue Mont-Royal Est, Montrealo

Vendredon la 25^{an}: MEDO, 19:30: Temo: Vojaĝoj kaj Pasporta Servo.

Novembro 2002.

Vendredon la 1^{an}: **Azia vespermanĝo** je la 18:00 ĉe Daniela, 7122, rue Fabre,

ap. 1, tuj apud metroo Fabre (kunportu azian pladon por dividi).

9-10^{aj}: **Semajnfino en Tri-Riveroj**. Vizito de la urbo kaj komuna manĝo kun lokaj Esperantistoj, vizito al Esperanto-strato.

Vendredon la 15^{an} je la 19:30: **Amika babilado** en *Café Espéranto*, 250 rue Mont-Royal Est, Montrealo.

Vendredon la 29^{an}: MEDO je la 19:30: Ludoj en esperanto

Decembro 2002.

Vendredon la 6^{an} je la 19:30: **Amika babilado** en *Café Espéranto*, 250 rue Mont-Royal Est, Montrealo.

14-15^{aj}: Semajnfina festado en Montrealo de la 20-jariĝo de ESK. Programo kaj loko anoncota.

Montreala Esperanto-Domo (MEDO), 6358-A rue de Bordeaux....

Januaro 2002, 1

Por pli vasta komunumo

Kial finfine mi devus aliĝi al: la loka Esperanto-klubo, la nacia landa asocio, la asocio de mia fako aŭ hobbio, aŭ al la Universala Esperanto-Asocio?

Ekzistas almenaŭ du bonaj kialoj.

- La Esperanto-asocioj je ĉiuj niveloj laboras por pli bona mondo, por mondo sen lingva kaj kultura diskriminacio, unuvorte ili laboras por "lingva demokratio".

Se vi opinias, ke tiu estas bona celo, vi certe volas subteni ilin. Aliĝante al via loka klubo aŭ al la nacia, faka aŭ monda asocioj (eventuale eĉ al ĉiuj tiuj), vi estos parto de tiu tutmonda Esperantomovado, kiu de pli ol unu jarcento laboras por homaj lingvaj rajtoj je ĉiuj niveloj, kaj provas konvinki la mondon, ke ankaŭ en la lingva-kultura kampo justeco valoras pli ol forto.

- Samtempe vi eble ŝatas simple esti parto de la komunumo, kiu parolas la internacian lingvon Esperanto.

Vi eble ŝatas renkonti aliajn parolantojn de Esperanto, vi ŝatas aĉeti librojn en

Esperanto, vi ŝatas vojaĝi al fremdaj landoj kaj koni ties loĝantojn kaj eventuale eĉ esti gastigata de lokaj esperantistoj.

Ĉion ĉi la membroj de Esperanto-asocioj

faras tute nature, ĉar ili estas daŭre informataj pri la revuoj, la libroj, la kongresoj, la ret-listoj kaj la ret-paĝoj, la korespond-anoncoj kaj la vojaĝeblecoj.

NASK ekmigras!

Post 32 jaroj en Sanfrancisko, NASK ekmigras! En 2002, la kursaron gastigos mondfama interkultura altlernejo, The School for International Training, en nordorienta Usono. Kune kun la profesiuloj de la lernejo, niaj instruistoj evoluigas novan kaj entuziasmigan studprogramon kiu emfazas la uzadon de Esperanto por interkultura komunikado kaj kunlaboro.

Datoj: 8-26 julio, 2002

Loko: Brattleboro, Vermonto (facile atingebla de Bostono, Novjorko, aux Hartfordo)

Instruistoj: D-rino I. Koutny (Hungario/Pollando), D-ro A. Melnikov (Rusio), D-ro R. Resende (Brazilo)

Kotizoj: loĝhado en dulita chambro kun manghoj, US\$640; kurskotizo, US\$900. Stipendioj haveblas.

Por pliaj informoj: pri SIT <http://www.sit.edu>

Vi rajtas skribi al Ellen por plia informo.
<mailto:eddyellen@aol.com>

La Riverego (Le Fleuve) est publikita per la Societe quebecoise d'esperanto en mars, jui, septembro et decembre. Depots legaux: Bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 0830-9574. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est permise, avec mention obligatoire de la source. Photocopie à 90 exemplaires. Gratuit pour les membres de la Société quebecoise d'esperanto. Autrement, l'abonnement annuel est de 10\$.

La Riverego estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia en marto, junio, septembro kaj decembro. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indoko de la fonto. Fotokopiata 90oble. Senpage por la membroj de la ESK. Por aliaj, la jara abono kostas 10 kanadajn dolarojn. UEA-doko de la Societo: kebk-d.

Échéance pour le prochain numéro/Limdato por la venonta eldono: 2002.05.01

Rédacteur en chef/Ĉefredaktoris Jessy LaPointe. Ont collaboré à ce numéro/Kunlaboris al tiu ĉi numero Normand Fleury, François Bay kaj Sylvain Auclair (Korektado). Administrateurs de la SQE/Estraranoj de ESK:

Normand Fleury (président/prezidanto), Jérôme-Frédéric Bouchard (vice-président/vicprezidanto), Sylvain Auclair (trésorier), Jessy LaPointe (secrétaire/sekretario) kaj François Bay.

Esperanto-Societo Kebekia/Société québécoise d'espéranto

6358-A, rue de Bordeaux

Montréal (Québec)

H2G2R8

Telefonrespondilo kaj telekopiilo/Répondeur et télécopieur: (514) 272-0151

jessylapointe@hotmail.com

<http://www3.sympatico.ca/esperanto>